

# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

**KATOLIKA SENTO**

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**



Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA



Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO
n° 2
53a Jaro Februaro 1974

## NOVA SOCIA PENSMANIERO POST LA HORO DE PROSPERO

(Antaŭ la recito de la "Anĝeluso" kun la kredantaro en placo Sankta Petro, Paŭlo 6a, dimanĉe de la 3a de februaro, tiel komentis pri la ne mallonga paŭzo de la "aŭstereco":)

"Tiu, kiu kutimas konsulti la horloĝon de la historiaj tempoj, en kiuj disvolviĝas la vivo de l' mondo, konstatas, ke la horo de la prospero, pri kiu ni estis preskaŭ kutimitaj esperi kaj ĝui, ŝanĝiĝis.
La prognozoj estas malĝojaj por tiuj, kiuj faris al si programon de vivo komforta, facila, ĝuema. Ne epoko de progreso subiris, eĉ ĉi tiu promesas novajn antaŭenpaŝojn. Subiris iluzia koncepto de moderna ekzisto facila, feliĉa, centrita en riĉeco posedata aŭ posedenda, liberigita de laciĝoj, de pacienco, de fortostreĉoj, de sobreco kaj ĉefe de priserĉado kaj estimo de internaj kaj spiritaj bonoj.

Ni disigis el la idealo ĉiam unuaranga, de libereco, la kompletigan, internan kaj ne malpli fundamentan, de la devo.

Ni faris el la socia vivo senĉesan kaj senaman luktokampon. Ni fariĝis fieraj kaj kelkfoje ferocaj, postulante personajn kaj privatajn rajtojn, kaj tiel ni forgesis ofte la senprofitan intereson por la komuna bono, por unueco kaj forto de vera socio, kiun oni povas difini Popolo. Tro ofte ni opiziciis al niaj historiaj kaj

civilaj institucioj por nin liberigi de la malloga obeado al leĝo, al aŭtoritato, al civila ordo.

Kaj nun krimeco timige progresanta, kiel kompetentuloj asertas, ŝajnas fariĝi organizita kaj profitodona arto, kvankam, feliĉe, ĉiam riska kaj malnobla. Sembrideco de moroj sin prezentas kvazaŭ eleganta signo de moderna vivmaniero. Kontestado, kvazaŭ elmontro de senantaŭjuĝa kuraĝo. Kaj kiu gardos gardistojn?

Kiel kapablos stari kaj rezisti vera kaj bona demokratia kunvivado, se ĝi estas korodata per laŭsistema forigo de principoj absolutaj? Se ĝi fariĝas pli kaj pli malforta pro steriliga sekularigo de moralaj ordonaj kriterioj?

La junularo ekperceptas ian nesufiĉon pro manko de principoj en nia socia pensmaniero; kelkaj ekscitiĝas, aliaj pripensas.

Verŝajne ĉi tiu ne mallonga paŭzo de aŭstereco favoros komunan pripensadon kaj sugestos pli solidaran kaj pozitivan proponon de konkordo, de laboremo, de socia progreso. Nia religia sento, kiu fandas ĉferon kun amo, devus helpi al klopodo de bona renovigo!

La preĝo subtenu ĉi tiun konfidon".

---

Dom Helder Camara, ĉefep. de Recife, je la 11a de februaro ricevis en Oslo la "Popolan Nobelpremion" pro sia agado favore al la justeco kaj paco en la mondo. La premio estis fondita per popola iniciato de pluraj kristanaj Eklezioj. Dom Helder deklaris, ke li transdonos la ricevitan monon (duon miliono da kronoj, t.e. ĉirkaŭ 150 milionoj da liroj) al malriĉuloj.

---

ROMA ESPERANTA VOĈO
n°125

## FLUGU FOREN, KARTO!

Flugu kolombe, flugu foren, karto:
transiru monton kaj transiru maron;
kaj portu vi tra ĉiu mondoparto
mian amikan sentan solidaron.

Portu la ĝojon kaj l' animan pacon
al suferanto kaj al afliktito,
transdonu pie la superan gracon,
la dolĉon kaj kvieton de l' spirito.

Al la homfratoj sur la vasta tero
bonvena estu la salutomaĝo
kun bondeziro por la vivprospero,
celado fundamenta de l' mesaĝo.

Alportu, do, heroldo karitata,
la baton de amema koro frata!

Luigi Minnaja

Roma, 25/ 1/ 1974

# LUIGI MINNAJA NE PLU ESTAS INTER NI!

La konsterna anonco, matene de la 27a de januaro trafis nin tiel krude, kvazaŭ li estus estinta unu el niaj plej karaj familianoj. Alkutimitaj al lia ĉeesto meze de ni, ni ne mezuris lian grandecon. Nur lia subita malapero montris fulmorapide, kian neripareblan perdon ni havis. Tian, ke kapturne ni sentis nin sen apogo, sen subteno, kun la angora sento de iu, kiu neatendite estis mergita en la plej profundan mallumon.
Antaŭ du tagoj li verkis sian preskaŭ tradician poeziaĵon por la Semajno de la Amikeco: "Flugu foren, kanto!" kanto de l' cigno de lia lirika sento, kiu malantaŭ la facila fluo de la pensoj, sin esprimis kun modela ĝusteco de la lingvo kaj fideleco al ĉiuj reguloj de la plej pura poezia stilo esperanta. (1)
Alian li verkis je la 21a, salutante sian tiutage atingitan diamantan jubileon! Ankaŭ ĉi tiun ni publicas hodiaŭ, ĉar, kvankam ĝi akrigas nian malĝojon pro lia abrupta perdo, estas tamen ia balzamo al nia koro la alteco de liaj sentoj.
Kiom da poeziaĵoj li verkis? Kelkaj el ili ricevis ankaŭ literaturajn premiojn. Ni esperas, ke iam ame kolektitaj, ili povu aperi kune en volumo. Tio certe allogus multajn personojn, kiuj konis lin, aŭ aŭdis lian voĉon.

---

(1) Ni pretigis kartojn por la "Semajno de la Amikeco" kun ĉi tiu poeziaĵo, portreto kaj nekrologo de la Aŭtoro.
Ĉiu karto kostas 20 lirojn.



Tre multaj, fakte legis liajn verkojn aù aŭskultis lian voĉon en kursoj aŭ prelegoj, kaj precipe ĉar dum pli ol jardeko, li estis fakestro de la esperanta angulo de la itala radio. Fidela al renkontiĝoj kaj kongresoj, ankaŭ persone li konatiĝis kun sennombra samideanaro. Lia hejmo estis ĉiam malfermita al la esperantistoj vizitantaj la Eternan Urbon. En ĉio helpita de sia amata edzino, prof.ino Carolina Minio Minnaja, samgrada al li en la perfekta posedo de la internacia lingvo kaj en la nobleco de la koro, li havis ankaŭ du filojn, hodiaŭ profesoroj. Kaj en lia hejmo oni uzis kutime la esperantan lingvon.

Grandvalora kaj tamen modesta, kiel ĉiuj liaj familianoj, li ne timis montri siajn religiajn sentojn. Niaj samideanoj povis kun plezuro kaj admiro legi en preskaŭ ĉiu numero de nia revuo liajn tradukojn de la plej signifaj paroladoj de la Papo aŭ pri religiaj eventoj. Kaj ne malofte tiuj estis menciitaj aŭ integre reeldonitaj de aliaj katolikaj periodaĵoj.

Kian admiron oni havis al li, montris la alfluo de multaj amikoj kaj konatoj, kiam oni donis al li la lastan adiaŭon per la funebra esperanta meso apud lia ĉerko en la paroka preĝejo, je la 29a de januaro, kvankam tiu estis labortago.

Ripozu pace, nia granda, priplorata, neforgesebla Amiko! Rememorante pri vi la Roma Grupo kaj ĉiuj viaj estimantoj kunigu siajn fortojn, vigligu sian agadon, aspiru sekvi vian elstaran ekzemplon!

El ĉi tiu revuo, kiu estis tiom kara al li, ne nur ni volas esprimi al lia fidela Kunulino kaj al liaj Filoj ankaŭ la sincerajn kondolencojn de nia tuta Roma Grupo, sed inviti ilin leviĝi al la fonto de konsolo, Kristo Jesuo, antaŭ kiu ne ekzistas vera morto, sed nur dormo, el kiu ni ĉiuj iam vekiĝos per lia voĉo por la eterna vivo.

# DIAMANTA JUBILEO

L' Amforan Signon ĵus la Sun' eniris!
Sepdek kvin fojojn tio jam okazis,
de kiam en la mondo mi ekspiris;
nek tio ĝenis min, nek embarasis.

Tiel ke nun feliĉe ĉio bonas,
kaj ĉe l' finiĝ' de mia viv-aleo,
kun flata bonaŭguro, kison donas
al mi la diamanta jubileo.

Vagas la penso, lamas la memoro;
en forgesejo mi la triston kaŝas;
nur laŭ la sulko de ĝojiga horo
mia spirito plej konvene paŝas.

Jen sur l' ekrano de la fantazio
sin sekvas svage bildoj, epizodoj
de l' tempo jam estinta, kun gracio,
patosaj kiel kantoj de rapsodoj.

En la jam plena juno saĝmatura
min kaptis kaj katenis idealo,
kiu fervore kreskis al futura
aspiro por anima madrigalo.

Dum bolis fortostreĉa laboremo,
el vualita nevidebla sido,
laŭ blinda sperto pri la agadsistemo,
per sia sago trafis min Kupido.

Nu, gravaj revoj tra la longa vivo:
amo regadis ja kaj Esperanto.
Iradas lante, pene nun l' aktivo,
lamento sonas en l' ołdula kanto.

Kaj serenigas dolĉa Kunulino
la tardajn, lacajn tagojn de l' destino!

Romo, la 16an por la 21a de januaro 1974a

Luigi Minnaja

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NIA PREZIDANTO, P.ALBINO CICCANTI, jam vizitinte Aŭstralion kaj Amerikon, krom multaj eŭropaj ŝtatoj, ĵus revenis de dumonata turneo tra la norda Eŭropo. Tiel li vizitis Norvegujon, Svedujon, Finlandon kaj Danmarkon, krom, pli rapide, Nederlando kaj Germanujo. Detale organizite kun la Esperanto-Centroj de tiuj ŝtatoj, per tiu turneo li povis kontaktiĝi kun esperantistaj grupoj de pli ol 30 urboj kaj prelegi antaŭ la plej malsamaj medioj, kiel lernejoj, laboristaj kaj religiaj kluboj. Kvindeko da intervjuoj, interesiĝo de radio, de ĵurnaloj kaj revuoj, montras kiel efikaj estis tiuj vojaĝoj de P.Ciccanti, konata de jaroj kiel "patro Esperanto", "patro aviostop" (li ofte vojaĝas senpage eĉ aviadile), "apostolo de la lingvo", misiisto de Esperanto".

Aparte utilaj ili montriĝis por informi lernantarojn pri la Internacia Lingvo, kaj ankaŭ por la ekumena movado, kiu unue devas forigi nubojn de ignoro kaj de antaŭjuĝoj, kiuj amasiĝis dum jarcentoj da miskomprenoj kaj reciproka malvarmeco. P. Ciccanti jam ricevis multajn aliajn invitojn, kiuj proksime kondukos lin denove en Germanujon, Pollandon kaj eble eĉ en Japanujon.

LA KAPUCENA P. Georgo Korytkowski, aŭtoro de "Ekumenismo kaj Internacilingva problemo" (v.KS.1973 p. 248), la volumo, kiu havis ĉie grandan sukceson, (ankaŭ "L'Osservatore Romano" 24a de januaro recenzis ĝin), estis akceptita de kard. Willebrands, prezidanto de la Sekretariato por Unuiĝo, la 6an de februaro. Prezentante al la kardinalo la libron, la kapucena pastro, studento en Romo, profitis la okazon por ilustri al la kardinalo la aktivecon de la katolika esperanta movado en la internacia religia kampo kaj aparte ĝiajn eblecojn por ekumenaj celoj. La kardinalo, kiu montris ĝojan intereson por ĉio, promesis al li aproban leteron.

DUM LA IKUE - KELI - kunveno de la ĵus pasinta jaro, la ĉeestantoj esprimis deziron ke, okaze de la Universala Kongreso en 1974a, oni denove renkontiĝu en la proksimeco de Hamburgo, la urbo de la Kongreso (Germanujo). La esperantistoj tie loĝantaj tuj zorgis pri la efektivigo de tiu ebleco, kaj ili trovis konferencejon ĉe la urbo: la "Hamburger Jugendpark Langenborn", Jugendparkweg 60, D-2 Hamburg 62. Ne luksa, tamen taŭga hotelo por la kunvenantoj, ekde la semajno antaŭ la U.K., kiam okazos la IKUE-KELI-kunveno, ĝis eventuale dum la tuta posta semajno, tiu de la UK. Ĉeftemo de la Kongreso, proponita de Jelly Koopmans, komisiita por la organizado, estas la AMO. Amo de Dio por ni; la amo de ni por Dio, nia Patro; la amo por ni mem, nia amo por niaj proksimuloj. Mallonge: la amo en ĉiuj siaj aspektoj.

KIEL NI JAM anoncis en KS de decembro 1973a, estas programita en Rimini kunveno de esperantistaj sacerdotoj por la tagoj 28, 29, 30 de aprilo. Sed hodiaŭ ni povas aldoni, ke ankaŭ la publiko povos ĝui pri tiu evento, la 29an de aprilo je la 17a horo.

ALIĜIS al U.E.C.I. kaj KATOLIKA SENTO (3a listo) :

Aosta: A. Falcoz; Bolonjo: E. Casagrande B.; Castellazzo B.: G. Carassa; Catania: G. Zappulla; Cesena: E. Bissi; Como: M.M.Noseda; Frascati (Romo). P.Urbajtis; Ĝenovo: G.B.Briano; Gorizia: I. Pellis; Grosseto: C. Cardoselli; Latina: N.Vessella; Mantova: N. Dell'Aringa; M.L.Marì; D.Zacché; Massa: C.Dazzini; I.E.Biblioteko; Milano: V.Dall'Acqua; G.Polerani; S. Giacchino T.; B.Pedron; C.Valvassori P.; Mogliano V.(TV): G.Venturini; Novara: G.Pisoni; Reggio Emilia: V. Munarini; Parma: E.Grupo; Rimini (FO): Ceccarelli C.; Romo: G.De Carolis; A. Antonelli; U. Cerqua; F.St.Messina; F.Venezia; Savigliano(CN): M. Mariano; M.Dogliani; Ternengo (VC): G.Cerutti; Udine: A. Blasoni; E.Grupo; P.Trevisani; Trento: P.Dao; E.Grupo; Vercelli: M.Sola; L.Sola; Verona: A.Vallotto; Vicenza: E.Grupo; Vivo (SI): O.Dinetti; Belgio: A. Beckers; Britujo: St.M.Sawicz; Francujo: R. J. Marmou; Thiollière; M. Pierru; Germanujo: R. Skorupa; Hispanujo: M.Martinez; Hungarujo: J.Szenthelay; T.Veszpremi; A.Szoboszlay; J.Dobos; J.Balint; J.Nagy; F.Nadi; Pollando: A.Gucwa; St.Pietrzak; H.Gorecka; H.Cura; T.Nowakowski; Z.Kłopocka; M.Sygnarski; St.Majewski. Entute: 240

---

El la Katolika Eklezio

---

NOVAJ NORMOJ PRI LA PENTOFARA SAKRAMENTO

La Kongregacio por la dia Kulto publikis je la 7a de februaro novan libron pri liturgia reformo, kun la latina titolo "Ordo paenitentiae" (Regularo de la pento).

Pri la latina lingvo ĝiaj normoj ek de nun validas, dum pri la naciaj lingvoj la valideca dato estos fiksita de la episkopaj konferencoj, post kiam la tradukoj de ili pretigitaj estos konfirmataj de la Sankta Seĝo.
Ankaŭ ĉi tie, kiel en la aliaj novaj ritaroj, la noveco ne devas esti serĉata en la doktrino, sed en la direktivoj kaj paŝtistaj indikoj por la praktiko de la sakramento.
La volumo havas du partojn: unu, la oficiala, pri la doktrinaj principoj, pri la liturgiaj kaj paŝtistaj normoj kaj pri la celebrado de la sakramento laŭ ĝiaj diversaj formoj. La dua prezentas ekzemplojn kaj skemojn.
Oni rimarkas, ke la titolo ne estas tute simple "konfeso", ĉar oni intencis montri la riĉecon de la sakramento, eĉ kiam ĝi ne konkludiĝas per la absolvo. Oni preferis uzi la esprimon "repaciĝo", "repaciga sakramento", laŭ la praeklezia kutimo, kaj la Tridentina koncilio.
En la nova rito oni volis plievidentigi la komununan kaj eklezian karakteron de la sakramento: la peko estas ofendo al Dio kaj ankaŭ al la fratoj; pro tio la pento estas repaciĝo kun Dio kaj kun la Eklezio, kiu kunlaboras per la karitato, ekzemploj kaj preĝoj al konverto.

La esencaj elementoj de la sakramento estas disvolvataj laŭ la tradicia instruado: pento, sinakuzo, riparo, absolvo. Ĉiuj estas necesaj, sed ilia viciĝo ne ĉiam estas egala, kiel ankaŭ hodiaŭ ĝi ne estas. Hodiaŭ, fakte, la absolvo estas donita antaŭ la riparo, dum antikve okazis tute male. Pro tio en la esceptaj kazoj permesitaj de la episkopo por la komunuma absolvo, ĉi tiu antaŭvenas la akuzadon de la specifaj pekoj.
Ĉi tio montras pli bone la esencan gravecon de la internaj dispozicioj (konverto kaj pento) kaj de la sacerdota absolvo.
La premisoj precizigas klare, kiam la celebro de la sa

kramento estas necesa, nome por la gravaj aŭ "mort-meritaj" kulpoj, kaj rekomendas ĝian uzadon ne deviĝan, tamen oftan, por akceli la strebojn al daŭra konverto kaj perfektiĝo de la bapta graco.
La esencaj vortoj de la absolva formulo ne estis ŝanĝitaj, sed ili havas unikan novan formulon, per kiu pli klare esprimiĝas, ke la repaciĝo de la pentofaranto estas donacó de la dipatra amo; oni rilatigas ĉi tiun eventon al la savhistorio, per kiu Dio repacigis al si la mondon per la morto kaj la reviviĝo de Kristo; oni substrekas la agadon de la Sankta Spirito pri la konverto kaj la sanktigado de la pekinto; fine, oni prilumas la eklezian aspekton de la repaciĝo, kiu pere de la Eklezio estas plenumita. La nova rito prezentas tri kazojn:

1 - Repacigo de unuopa pentofaranto. Ĝi uzas ankoraŭ la aktualan formon en la esenca parto; sed multe pli riĉa laŭ la teologia aspekto en la enkonduko, kiu tamen povas esti forlasata, kune kun la antaŭvidita legaĵo de la dia vorto, se la nesufiĉo de la tempo tion postulos.

2 - Repacigo de pluraj pentofarantoj kun ĝenerala absolvo per komuna aŭskultado de la dia vorto, konscienc ekzameno kaj oportunaj preĝoj; persona pekkonfeso kaj absolvo; kaj laste, per komuna dankopreĝo kaj ĝojesprimo.

3 - Repacigo de pluraj pentofarantoj kun ĝenerala absolvo, prokrastante pekkonfeson. Ĉi tiu ĝenerala absolvo povas esti permesata de la episkopo pro esceptaj kazoj jam precize antaŭviditaj en la "paŝtistaj normoj". Neniam tamen ĝi povas esti kunligata al la meso.

La episkopaj konferencoj precizigos kaj adaptos ĉiujn detalojn de la ne esencaj punktoj.
Interesa estas ankaŭ la atentigo, kiun la nova "Ordo" invitas doni al sociaj temoj, kiel fonto de kulpoj: manko

de defendo de subpremitoj, de helpo al malriĉuloj kaj suferantoj, de socia justeco, de publika honesteco, malĝusta salajro al laborantoj, malobeado al ŝtataj leĝoj, ktp. Ĉio ĉi tio indikas unue laŭgradan transpason de moralo, kelkfoje tro fermita en la individua persono, al la efektiva vivkondiĉo de la nuntempaj pli sociemaj homoj kaj al konstruo de vera, pli kompleta kristana personeco; kaj ankaŭ al pliigo de responda kredo, pli adolta, ĉerpita rekte el la evangeliaj fontoj.

LA UNUA "SANKTA JARO" estis proklamita per buleo de papo Bonifaco 3a, je la 22a de februaro 1300. Tiel tiu papo forta kaj severa kontraŭ la multaj siaj opoziciantoj donis ateston de grandanimeco, de paco kaj pardono. La pergameno de la Buleo estis eksponita de la papo sur "la konfesa altaro", la altaro de la tombo de Petro, por ke ĉiu vizitanto povu ĝin legi; kaj poste ĝia teksto estis skulptita sur marmora tabulo, ĝis hodiaŭ videbla en la bazilika enirejo.
La anonco de tiu jubileo trakuris rapidege Eŭropon, tiel ke jam antaŭ la oficiala proklamo, ekde la komenco de tiu jaro, Romo svarmis je pilgrimantoj kunvenintaj el ĉiu eŭropa lando. Kaj tiu estis vere pentofara pilgrimado, kiun oni plenumis piede dum semajnoj kaj monatoj. Severaj estis ankaŭ la kondiĉoj: dum tridek tagoj la romanoj mem kaj dum dek kvin ĉiuj aliaj, devis viziti la malproksimajn inter si preĝejojn de S. Petro kaj de Paŭlo. Multaj pilgrimantoj faris antaŭe sian testamenton, ĉar krom la multaj riskoj de tiu longa vojaĝo, ne mankis bedaŭrinde ankaŭ tiuj de rabistoj. Tiel ne malgranda estis la nombro de mortintoj dum tiu pentofara irado.
Laŭ la tiutempaj historiistoj, en Romon eniris ĉiutage ĝis 30.000 pilgrimantoj, kaj dum la tuta jubilea jaro ĝin vizitis du milionoj da kredantoj. Ankaŭ la fiera florenca poeto Danto kuniĝis humile al la pilgrimantaro.

Se oni pensas al la malfacilaĵoj de la antikva vojaĝmaniero, oni devas agnoski, ke tiu pilgrimado estis mirinda atesto de kredo kaj de pento. Tion komprenis bone la tiutempa kristanaro. Ĉu la nuntempa mildigo de la kondiĉoj por akiro de la granda indulgenco kaj la komforta moderna vojaĝebleco donos ankaŭ al ni saman spiritan disponon?
La jubileo de la 1300a jaro donis notindan impulson ankaŭ al la artaj manifestadoj, kiel esprimo de pli profunda religia vivo. La papo donis ekzemplon, fariĝante granda meĉenato de artistoj: pentristoj, skulptistoj arkitektoj, miniaturistoj. Kunlabore kun kardinaloj, kiel Stefaneschi kaj Orsini, oni komisiis verkojn al Arnolfo di Cambio, oni kolektis manuskriptojn por la apostola biblioteko, oni mendis miniaturojn de Oderisi kaj Franco Bolognese; estis riparita la Laterana Baziliko, oni kontribuis por la starigo de la katedralo de Orvieto kaj de la Minerva baziliko; favorataj estis la marmoraj kaj mozaikaj laboroj de la Kosmatoj kaj de Cavallini, restaŭritaj kaj riĉigitaj la baziliko de S.Petro kaj multaj aliaj romaj preĝejoj. Giotto donis impulson al nova erao de l' arto, kaj Danto centrigis tiun sian vizion, kiu kunigis la ĉielon kun la tero, sin inspirante al la roma jubileo.

"LA STATISTIKA JARLIBRO de l' Eklezio 1971a". En la januara numero ni jam anoncis la aperon de ĉi tiu libro, eldonita de la centra oficejo de la ŝtata Vatikana Sekretariato. Daŭrigante la skemon de la antaŭa jaro, la volumo donas la plej signifajn indikojn pri la vivo kaj agado de la Eklezio en la mondo, ĝis datigitajn je la 31a de decembro 1971. Ni eltiris el tiu diligenta verko kelkajn indikojn utilajn kaj interesajn.
Unua indiko: el la tutmonda loĝantaro, atinganta 3 miliardojn, 645 milionojn kaj 829.000 homojn, la katolikojn - kun rondigo de 5 milionoj pro la 25 departamen-

toj, el kiuj estis neeble ricevi precizajn indikojn - estas 669 milionoj, nome 18,3 procentoj. Laŭ kontinentoj, la plej alta proporcio estas en la du Amerikoj (60 katolikoj por cent loĝantoj); poste en Eŭropo (40 procentoj) por fini kun Azio (2,3 procentoj, pro la ĉeesto de multaj aliaj ne kristanaj konfesioj.)
Ne kalkulante la laikojn, la apostolaj fortoj estas: 270.737 diocezaj pastroj, 149.692 regularaj; 78.350 ne sacerdotaj religiuloj, 470 stabilaj diakonoj kaj 1 miliono 14.971 votintaj religiulinoj. Kreskis kompare al la pasinta jaro la nombro de pastroj en Afriko (27,1 por mil), en Azio (17,7) kaj Oceanio (7,5), sed malpliiĝis en Eŭropo (4,6 por mil) kaj en Ameriko (3,4), kvankam pliiĝo en Pollando kaj en Jugoslavio iom kompensas. La plej rimarkinda foriĝo de diocezaj sacerdotoj estis en Francujo (165 el 38.116), en Hispanujo (196 el 24.881) kaj en Italujo (113 el 42.868). El 168.657 regularaj sacerdotoj en Eŭropo, dum kvar jaroj forlasis sian ordenon 1765. Sed inter la 155.513 membroj de sekularaj institutoj, kvankam en la sama tempo preskaŭ dudek mil seminarianoj forlasis siajn institutojn, estiĝis konstanta kaj rimarkinda pliiĝo.
El la statistika jarlibro reliefiĝas ankaŭ, ke en 1971 la baptoj estis 17 milionoj 117.633; inter ĉi tiuj, 1 miliono 103.823 en aĝo pli ol sepjara. Fine, 3 milionoj 723.258 estis la gedziĝoj inter katolikoj, kaj 269.271 inter personoj kun malsama kredo.

"KALVINO KAJ LUTERO" estas titolo de nova libro ĵus verkita de p.Boyer, emerita profesoro en la Pontifika Gregoria Universitato kaj Prezidanto de la internacia asocio: "Unitas". Ni volas resumi ion el intervjuo donita en tiu okazo.
En la enkonduko de la libro, la jezuita pastro informas nin, ke de jarcenta kvarono li okupiĝas pri ekumena movado. Ĝia komenco - li diris - okazis ĉirkaŭ la 1910a ja

ro, kiam la anglikana konfesio faris kelkajn paŝojn renkonten al la protestantaj. Tiuj klopodoj post ne longe etendiĝis al kelkaj ortodoksaj eklezioj, kaj estis observataj kaj sekvataj kun intereso ankaŭ de la katolika.
Granda antaŭenpaŝo estis farita kiam en Amsterdamo je la 1948a jaro fondiĝis la Ekumena Konsilio de la Eklezioj. Tiel multegaj eklezioj komencis alproksimiĝi inter si, starigi kontaktojn kaj krei novan atmosferon de reciproka toleremo kaj respekto. La katolika eklezio ne estis inter ĝiaj membroj, kiel ankaŭ hodiaŭ ĝi ne estas; sed ĝi kunlaboras kun tiu institucio; sub papo Johano 23a kaj per la Dua Vatikana Koncilio ĝi eniris oficiale en la ekumenan movadon, kies celo estas unuigo de kristanoj.
Unua etapo estis jam atingita per la konscio de tio, kiu kunigas la kristanojn kaj ebligas fratajn rilatojn. Estas tamen necese atingi la alian, kiu konsistas en la forigo de la diverĝoj pri kredo.
La libro "Kalvino kaj Lutero" (234 paĝoj en la franca eldono) ne estas disputema verko. Ĝi intencas prezenti la kalvinan doktrinon kia ĝi estas, akcentante la puntojn, en kiuj ĝi malproksimiĝas de la roma eklezio. La libro apenaŭ parolas pri la akraj atakoj de Kalvino al katolikismo.
Laŭ la aŭtoro la doktrino pri antaŭdestino estas centro de la tuta kalvina vidpunkto. Sed, ĉar libroj celantaj diskutadon pri tiu temo ne mankas, la aŭtoro preferis sekvi la hodiaŭan ekumenan tonon. Laŭ Kalvino la vera eklezio - estas preskaŭ superflue diri -, estas nur la reformita; tamen li agnoskas, ke samtempe ankaŭ la aliaj kristanaj eklezioj posedas kelkajn "restaĵojn de la vero".
Hodiaŭ ni insiste asertas, ke ekster la katolika roma eklezio ekzistas multaj veroj, donacoj ili ankaŭ de Kristo, gardataj de la disiĝintaj fratoj; kaj tiuj donacoj pro la bona intenco, sufiĉas por la savo. La komuno de ti-

uj donacoj konsistigas la nunan neperfektan unuecon de la kristanaro, kaj la bazon de ekumenismo.

P.Boyer agnoskas, ke notinda kvanto de la kristana doktrino estis gardata de Kalvino, kaj ke li estis povinta verki kiel katoliko multajn el siaj paĝoj. Li gardis la fundamentajn misterojn de la Triunuo, de la enkarniĝo, de la elaĉeto kaj la principojn de la kristana moralo. Li gardis pli bone ol Lutero la ideon de eklezio unika, sankta, katolika (universala), apostola. Kaj pli bone ankaŭ li postulis sendependon de la civila ŝtato kaj la ekstera disciplinon. Kiam Kalvino parolas pri Dio, li verkas belegajn paĝojn, kiuj povus esti subskribataj de moderna bona katoliko. Li insistas pri neceso de sanktiĝo, tio estas de bonaj agadoj, kontraŭ la Lutera principo, de justiĝo pere de nura kredo. Têmas pri aserto, kiu kvankam allasas erarojn, tamen savas gravan veron.

P.Boyer konkludas, ke fakte en la Kalvina doktrino profundaj estas la diferencoj kun la katolika; sed Kalvino estus povinta skribi siajn plej belajn paĝojn, eĉ pli bone, restante en la katolika eklezio.

LA 12a DATREVENO de la morto de Maria Valtorta, okazinta en Viareggio, estis la unuan fojon memorigita en Florenco, je la 12a de oktobro 1973a en la Baziliko de la Anunciacio, kie ek de la pasinta julio ripozas la restaĵoj de tiu escepta virino. Ne multaj ankoraŭ konas tiun fekundan verkistinon, kiu el la lito de sia malsaneco kapablis dum 4 jaroj verki, inter aliaj malpli gravaj libroj, dek volumojn (entute 5470 paĝojn), titolitajn: "Poemo de l' Homo-Dio".

La kolekto temas pri la evangelia rakonto, multe pli ampleksa, ol ĝi estas en la kanonaj libroj, rakonto kiun la aŭtorino skribis sub diktado de interna voĉo, kiun ŝi atribuis al Jesuo, kelkfoje al Maria, aŭ al kelkaj sanktuloj. Eĉ se oni ne povas difini tiujn verkojn kiel re-

velaciitajn, aŭ inspiritajn aŭ nur inĝenian elpensadon, oni tamen estas trafita pro ilia profundeco, ĉarmo kaj ekzakteco eĉ pri la geografia kaj historia vidpunkto. Okaze de tiu celebrado, prof. G.Gabrielo Roschini O.S.M. prezentis sian novan volumon "La Madono en la verkoj de Maria Valtorta". Edizioni Pisani - via Napoli 85. 03036 Isola del Liri. P.Roschini, unu, certe, el la plej famaj modernaj mariologoj, estis fondinto en 1939 de la internacia revuo "Marianum" kaj en 1950, de la roma samnoma teologia Pontifika Fakultato, kiun li estris dum dek kvin jaroj. Lia merito estis interalie la reordigo kaj renovigo de la Biblioteko pri Maria" la plej riĉa en la mondo. Tro longe estus memorigi liajn tre gravajn taskojn, titolojn, premiojn, kiujn li ricevis. La esperantistoj memoras, kun aparta plezuro, lian favoran sintenon pri Esperanto, pri kiu li verkis longan artikolon, aperintan en "L'Osservatore Romano", je la 23-11-1951a.

OKAZE DE EKUMENA RITO en la preĝejo de la anglikana komunumo de Milano, organizita por la porunuiga preĝtagoko, parolis dum la "Holy Communion" (Sankta Komunio) la episkopo de Crema, mons. Manziana, unu el la malmultaj italaj katolikaj sacerdotoj, kiuj supervivis al la "lager" de Dachaŭ.
Kortuŝite la episkopo memorigis, ke pli ol 2500 sacerdotoj, pastoroj kaj ortodoksaj popoj trapasis tiun regnon de la malamo. Sed ilia ĉeesto montris, kiel homa kaj kristana amo povas venki malamon. Luteranaj pastoroj, katolikaj kaj ortodoksaj sacerdotoj kunpreĝadis en barako. Ortodoksoj ofte partoprenis en la katolika eŭkaristio. Tiel naskiĝis vera frateco spirita, eĉ sakramenta, kiu fortiĝis kaj montriĝis ĉefe en la plej minacaj momentoj. Fakte eĉ antaŭ turmentoj kaj morto la komuna preĝado en frata kuniĝo donis serenecon. De tiam - konkludis mons. Manziana, ĉi tiu praktika eku-

menismo, ĝerminta inter pikdratoj de "lager", faris multajn paŝojn antaŭen. Hodiaŭ, preĝante kune, ni jam sopiras je la tago, en kiu ni ĉiuj povos ankaŭ partopreni en la sama eŭkaristia tablo".
En la universala preĝo oni preĝis por la Paco, por la Ĉefepiskopo de Canterbury, por ŝtatestroj, por la paco en la mondo kaj la kuniĝo de la Eklezioj.
Poste la ofertorio, la konsekro kaj la komunio. En ĉi tiu punkto, en videbla kaj doloriga maniero, sed kiu necesis por memorigi la pluirendan vojon, dum anglikanoj kaj evangeliistoj alproksimiĝis al la altaro, la katolikoj ne moviĝis, ĉar ĝis nun ne eblas interkomunio de la katolika kaj de la anglikana eklezioj. Sed la himno, kiun ili kantadis, tre bone esprimis la esperon de la unueco petita de Kristo: "ke ili estu unu". La anglikana himno ripetadis: Unu kredo, unu Dio, unu Eklezio".

DU MALNOVAJ FERVOJAJ VAGONOJ estis adaptitaj al monakejo.
Dek fratoj, celante reveni al plia severeco de la franciskana vivo, decidis efektivigi ĉi tiun eksperimenton ĉe Palermo. Ili kovris la du vagonojn per mato el seka foliaro, por iom mildigi la varmecon de la sicilia suno. Tiel la fratoj celas travivi la aŭtentikan malriĉecon de la fondinto, Sankta Francisko, lian pli intensan spiritualismon, kontempladon, humilan evangelizadon. Por tion efektivigi, ili petis kaj ricevis aprobon de la Sankta Seĝo ĉe la fino de 1972, kiel komunumo de Reformitaj Minoraj Fratoj.

LA MIKSA INTERNACIA KOMISIONO de la anglikana kaj de la katolika eklezioj publikis je la 13a de decembro komunan dokumenton en Londono pri "la pastra ofico kaj la sacerdota ordino", fokusiganta la doktrinajn konverĝojn inter la du eklezioj pri tiu problemo. Ĉi tiu estas la dua dokumento prezentita de la komisiono, en

kiu partoprenas teologoj kaj juristoj - 11 katolikoj kaj 11 anglikanoj - klopodantaj trovi kunigajn aŭ almenaŭ alproksimigajn punktojn inter la du eklezioj.
La unua, publikita en septembro 1971a en Windsor, rilatis la doktrinon pri eŭkaristio. Dum siaj renkontiĝoj, disvolviĝintaj en Canterbury, la komisiono atingis larĝan doktrinan interkonsenton pri la problemo de la pastra ofico kaj de la ordino. Ĝi alvenis al ĉi tiu rezultato, evitante reveni al la pasintaj diverĝoj, kaj aparte, al la buleo "Apostolicae curae" de papo Leono 13a kiu, en 1896, proklamis ne validaj ĉiujn ordinojn de la anglikanaj pastroj de post la disiĝo.
La komisiono substrekas, ke la dokumento, kiun ĝi prezentis, neniel devigas la eklezioj interesitajn, sed nur la komisionon mem. La dokumento estis publikita kun la permeso de ambaŭ ekleziaj aŭtoritatoj.

PRESKAŬ 73 MILIONOJ estas la luteranoj en la mondo. Tion asertas la tutmonda Luterana Federacio, precizante, ke en la lasta jaro oni konstatis malkreskon, kalkulitan je cent mil unuoj. La plej nombra luterana lando estas la Okcidenta Germanujo, en kiu la kvanto de la fideluloj ĝenerale pliiĝis, dum malkreskis en la Orienta.

KARD.CONWAY, ĉefep.de Armagh kaj primato de Irlando energie protestis kontraŭ la timtruda kaj mortminaca kampanjo opozicie al la katolika loĝantaro de la Norda Irlando. "Ekde la fino de la pasinta jaro ĝis nun - li memorigas - 150 katolikoj estis mortigitaj laŭ la stratoj de nia lando. Preskaŭ ĉiam - li asertis - temis pri katolikoj nepre senkulpaj, viktimoj de serio da brutalaj hommortigoj; krome, multaj el tiuj viktimoj estis torturitaj". Akcentinte, ke granda parto de la mondo ignoras ĉi tiujn dramecajn realojn, ankaŭ pro tio, "ke la aŭtoritatoj kovras per silentkovrilo la kontraŭkatoli

kan terurigan kampanjon", kiu "evidente estis zorge organizita", la kardinalo aldonis: "Mi estas devigata aserti, ke la katolika loĝantaro estas maltrankvila, ĉar la aŭtoritatoj ne agnoskis manifeste la ekziston de ĉi tiu kampanjo kaj la proponitaj rimedoj por kontraŭstari al ĝi estis entute nesufiĉaj". La kardinalo agnoskis ankaŭ, ke li ricevas daŭre atestojn, ke la plejmulto de la protestanta loĝantaro mem kondamnas kaj abomenas ĉi tiujn sektecajn krimojn".

JE LA 3a DE FEBRUARO mons. Casaroli flugis denove al Pollando. En la flug-haveno Okecie de Varsovio, li estis akceptita de ministro Olszowski kaj de la prezidanto de la registara oficejo por religiaj aferoj, vicministro Aleksander Skarzynski. La pola eklezio estis reprezentita de la episkopa sekretario, mons. Bronislaw Dabrowski, kiu tamen deklaris, ke lia ĉeesto estas nur pro respekta ĝentileco, ĉar mons. Casaroli estos oficiala gasto de la registaro kaj ne de la ekleziaj polaj aŭtoritatoj.

Dum mallonga deklaro ĉe presagentejo, mons. Casaroli asertis interalie, ke la interparoloj, kiujn li havos en Varsovio kun ministro Olszowski konsistigos gravan eventon pri la rilatoj inter Pollando kaj Vatikano kaj pri la internaj aferoj de la eklezio kun la pola ŝtato, aldonante, ke ili reprezentas vojturnon pri la reciprokaj rilatoj. "Al ambaŭ partoj mankas nek bona volo nek konstanteco por superi la malfacilaĵojn, kiuj malhelpas kompletan normaligon"- diris Casaroli. Li aldonis, ke lia tasko estas antaŭenpuŝi interparoladon; kaj li sin deklaris optimista.

La oficiala vizito daŭris tri tagojn, dum kiuj la Vatikana gasto renkontiĝis ankaŭ kun la pola ŝtatestro Henryk Jablonski kaj kun ĉefministro Piotr Jaroszewicz. La polaj informiloj publikis samtempe multajn artikolojn pri Casaroli, reliefigante lian prudenton kaj diplomatan ka

pablecon. Laŭ ili, ĉi tiu unua oficiala vizito (difinita "internacia eksterordinara evento") de la ministro por eksterlandaj aferoj de la Sankta Seĝo en Pollando, socialista ŝtato, en kiu la katolikaj tradicioj estas tre sentataj kaj la plejparto de la loĝantaro estas katolika, havas apartan gravecon, ne nur ĉar tio signifas novan paŝon renkonten al trankvilo en Eŭropo, sed ankaŭ ĉar la politiko de la pola ŝtato celas aktive normaligon de rilatoj kun la Eklezio kaj Vatikano.

OMAĜO AL KANONIKO Nikolao Koperniko en la 500 jara datreveno de lia naskiĝo.

Tuta Pollando kaj la tuta mondo celebris en 1973a jaro la grandan datrevenon. Jen antaŭ 500 jaroj naskiĝis en Toruń unu el la plej grandaj astronomoj de ĉiuj tempoj, filo de pola lando, Nikolao Koperniko, Li, pastro, juristo, kuracisto, studis en Krakovo, Bolonjo, Padovo, Ferraro. En la jaro 1497a oni lin elektis kanoniko en Frombork. Lia plej grava verko "De revolutionibus orbium coelestium" (Pri rivoluoj de ĉielkorpoj), detruis malnovan kaj falsan sistemon de Ptolomeo, tiel nomatan geocentran, kaj enkondukis la novan revolucian sciencsistemon, heliocentran. Laŭ doktrino de Ptolomeo la tero estas senmova kaj ĉiuj ĉielkorpoj kune kun la suno turniĝas ĉirkaŭ ĝi. Koperniko pruvis kaj sciencе motivis, ke la tero turniĝas ĉirkaŭ la suno. Li haltigis la sunon, movis la teron.

La granda astronomo, fidela filo de Eklezio, post medicinaj studoj en Bolonjo, revenis Pollandon kiel kuracisto. Li ankaŭ akiris diplomon de doktoro pri juro en universitato de Ferraro. La lerta diplomato sukcese batalis kun Kruckavaliroj, kiuj per sango, brulo kaj glavo instruis kristanan kredon al nefideluloj.

Li vivis en plena soleco, forgesita jam dum la vivo. Mortis en la 1543a jaro.

Okaze de la 500-a jara datreveno de lia naskiĝo, jaro

1973 estis dediĉita en Pollando al scienco kaj proklamita kiel Jaro de la Scienco. Okazis multaj solenaĵoj, en Pollando kaj en multaj landoj de la mondo, omaĝe al granda kanoniko el Frombork.
Ankaŭ la pola Eklezio solene celebris tiun grandan datrevenon. Episkoparo eldonis ĉi-okaze specialan leteron al fideluloj, kiu montras la riĉecon de virtoj kaj saĝecon, grandan sciencan laboron kaj amon al la vero - devizoj de la granda saĝulo. Ankaŭ Papo Paŭlo VIa sendis gratulan leteron kaj sian apostolan benon al nia popolo.
Ĉefaj solenaĵoj okazis en Frombork. Estis kardinalo - primaso D-ro Stefan Wyszynski. Partoprenis kardinaloj, episkopoj polaj kaj eksterlandaj, pastraro kaj ega aro da fideluloj el la tuta Pollando. Urbo Frombork estis ne nur loĝejo sed ankaŭ laborejo de la granda astronomo. Tie ankaŭ troviĝas verŝajne lia tombo, sed ĝis nun oni trovis nek lian ĉerkon, nek tombon.
La granda kanoniko Koperniko estas simbolo de vera scienco, kredo en Dio kaj amo al proksimuloj.
Sekvantaj jarcentoj ekbrilos per novaj, grandiozaj polaj steloj.

Sac.Dr.Zbigniew Kucewicz
Pollando

ĈU LA S.SEĜO partoprenos en la Ĝenevaj porpacaj traktadoj pri Mezoriento, estas hipotezo ankoraŭ nematura, laŭ la Vatikana porparolanto Federiko Alessandrini, responde al demando, rilatanta kelkajn onidirojn de la Libana presagentejo, laŭ kiu la S.Seĝo estis invitita al unu el la kvin komisionoj por pritraktado de mezorientaj problemoj. "Multaj kondiĉoj - diris Alessandrini - devus antaŭe esti kontrolitaj kaj konfirmitaj ; unue oni devos vidi, ĉu kaj kiel okazos tia konferenco. Estas do malfacile nun paroli pri kvin komisionoj. Tamen - li aldonis - estas konata la atento, kiun

la S.Seĝo havas por la problemoj de Mezoriento".

LA UNIKA ĈIUTAGA ĴURNALO en la tuta Afriko,"Munno", (kio en la lunganda lingvo signifas "via amiko"), devigita haltigi siajn publikaĵojn en la pasinta oktobro, ĵus denove aperis.
Naskiĝinta kiel simpla periodaĵo en 1911,"Munno" fariĝis ĉiutaga antaŭ dek jaroj. La 14an de januaro 1973 ĝia direktoro, patro Clement Kiggundu, uganda sacerdoto, diplomita pri ĵurnalismo ĉe usona universitato, estis mortigita apud Kampala, kaj lia kadavro estis trovita karbigita en la aŭto, per kiu li vojaĝis. Aktuala direktoro de "Munno", kies redakcia stabo konsistas nur el afrikanoj, estas la laiko Simon Mwebe.

EN USONO LA VENDADO de libroj pri religia temo notinde progresis kompare al 1971, laŭ la indikoj publikitaj de la asocio de la amerikaj eldonistoj. La kvanto de la vendo de tiuj libroj, kreskis, fakte, je 9 milionoj da dolaroj. La religiaj libroj estas klasifikitaj laŭ du kategorioj: unu, rilatanta la Biblion, eldonojn de la Nova Testamento, preĝlibrojn, kiuj pasis de 117 milionoj da dolaroj pro vendo, al 129 milionoj; la dua entenanta ĉiujn aliajn librojn pri religia temo, kiu kreskis de 61 al 63 milionoj da dolaroj. En la 1971a la kvanto de la vendo de la religiaj libroj ĝenerale, restis preskaŭ la sama kompare kun la antaŭa jaro.

EN MALAJZIO ankoraŭfoje tri nederlandaj misiistoj devis forlasi Sabah je la duono de oktobro, ĉar la loka registaro ne renovigis al ili restadpermeson. Tiel la misiistoj forigitaj dum tri jaroj atingis jam la nombron de 34! Surloke restas ankoraŭ 10 nederlandaj misiistoj kaj du fratoj, kun 12 sacerdotoj kaj 60 religiulinoj aŭtoktonaj. Eĉ la apostola vikario, mons. Petro Chung Wang Ting, neniam povis ricevi loĝpermeson en Sabah. La loka registaro estas entute en la povo de muzulmanoj.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

| | |
|---|---|
| *Quota di abbonamento L.* **1500** | |
| *Abonkotizo* | *italliroj* **1500** |

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE